

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

La landoj de AK kaj de UK — Hama-Ronda Vespero en marto —

La Hama-Ronda Vespero okazis en la 16a de marto, en nia kutima kunvenejo. La temo estis la landoj de ĉi-jaraj internaciaj kongresoj, nome la 9-a Azia-Oceania Kongreso de Esperanto (AK) en Vjetnamio, kaj la 104-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Finnlando. Partoprenis entute 14 personoj.

1. Iwaya Mituru, partoprenonta la AK-n, prezentis Vjetnamion. Li komencis de komparo de la landoj Japanio kaj Vjetnamio, kaj poste prezentis la vidindaĵojn de la kongresurbo Danang kaj aliaj vjetnamaj lokoj.

2. Sibayama Zyun'iti prezentis i.a. pri Gustav John Ramstedt (1873-1950), la unua finna diplomato rezidanta en Japanio, kiu estis samtempe fervora esperantisto. Hazarde, Ramstedt pasigis plurajn jarojn en Lahti, ĉi-jara kongresurbo, kiel lingvoinstruisto.

3. Namba Fumiharu, fervoj-amanto, prezentis la fervojan situacion en Finnlando kaj precipe ĉirkaŭ Lahti. Li ja intencas veturi noktotaŭne de Rusio al Lahti per internacia trajno, kies finstacio estas Helsinki.

Ekiris 9-ope, finis 10-ope — Flor-apreca ekskurso al Ŝikinomori-Parko —

En la 1a de aprilo (lundo), kelkaj el niaj anoj ekskursis, vizitante Ŝikinomori-Parkon (Legu eseon sur p.3 de la marta numero) en la norda parto de Jokohamo. Dum nubis, 9 anoj, gvidate de s-ro Akiya Hideo, loĝanta proksime, eniris la parkon de la suda pordo, post busa veturado de la Stacio Nakayama.

Preskaŭ plenflorantaj sakuroj estis videblaj tie. De tie ni malsupren marŝis tra padoj, kaj tamen atingonte la nordan pordon kun tegmentita restejo, ekpluvis. Tie antaŭ la tagmanĝo, aliĝis al ni s-ino Takahasi Kimiko. Poste ni promenis ĉirkaŭ lago en pluveto, kaj decidis iom frue fini la ekskurson, piede marŝis al la Stacio Nakayama kaj disiĝis.

sub florantaj sakuroj ĉirkaŭ la suda pordo →





ĉirkaŭ la norda pordo

(fotitaj de s-ro Aida Kiyoshi)

La 114-a Legokunsido

En la 2a de marto ni havis la 114-an legokunsidon por "Pri arto kaj morto", originala novelaro de Miyamoto masao. Partoprenis kvin personoj.

Kalejdoskopio de japana artohistorio "Pri arto kaj morto" de Miyamoto Masao

Mizro Iwaya

Laŭ mia memoro proza verko de la aŭtoro estas malofta. Kaj plejmulto el ili aperis en la komenca etapo de lia verkado. Nu, tiu ĉi estas ilia kolektaĵo, kiu temas pri longa periodo de frua historia epoko, Nara, ĝis la epoko de Mejĵi, antaŭ 120 jaroj. Ni vidas ke la aŭtoro detale studis historion de japana belarto.

La aŭtoro trovis ian karakterizan trajton en ĉiu epoko. Ekzemple en la aŭrora epoko de japana literaturo, Nara-epoko, li trovis ke la unua utaaro "Manjoo" estas kompilita el vaste dispersitaj fontoj: de la imperiestro ĝis malriĉaj kamparanoj. Ni vidas el postaj ekzemploj, ke la eldonitaj libroj estas ofte influitaj aŭ eĉ cenzuritaj de tiamaj aŭtoritatoj. Tamen se temas pri Manjoo, tia spuro ne troviĝas en ĝi. Ĉu la mondo estis tiel naive liberala en tiu epoko? Ne. La aŭtoro opinias ke la kompilintoj estis pluraj, kaj la pleja aŭtoritatulo, la imperiestro, mem konsciis la gravecon de tia antologio. Tiamaniere rezultinta liberaleco donis al la kompilaĵo nepreterlaseblan valoron.

Lasta peco pri Yosano Hiroshi (Tekkan) estis

alience interesa. Lia edzino Yosano Akiko estas fama poetino, kiun ĉiu japano bone scias. Do kia estis lia situacio kun ŝi? Precipe en Japanio edzo devis, onidire, superi sian edzinon. Ŝi estis unue lia disĉiplo, kaj poste kreskis al superedza giganto. La aŭtoro fokusis nian atenton al li, kaj ripete kritikaĉis liajn verkojn kaj konduton. Tio eĉ vekas nian kompaton al la malfeliĉa edzo.

Ni japanoj povas ĝui diversajn detalojn rilate al la historio de japana belarto per tiu libro. Eble eksterlandaj legantoj, ne familiaraj kun ĝi, devas multon lerni rilate al la enhavo de tiu ĉi libro, ĉar ĝi estas fakte kalejdoskopio de japana artohistorio

Pri Rikyū kaj Utamaro – Recenzo de la libro "Pri arto kaj morto"

Aida Yayoi

Mi elektis du verkojn el ok en la libro "Pri arto kaj morto" verkita de Miyamoto masao. Entute tiuj ok noveloj estas sendependaj unu de aliaj en temoj, rakontoj aŭ eraoj, sed havas komune efikajn elementojn kompletigi ĉarman sintezon. Dank' al lerta kapablo de la verkisto naskiĝis fruktdona literaturo.

“La lasta te-seanco” traktas morton de Rikyû, postulitan de Lia Kampaka Moŝto Hideyosi. Kontraŭ la kondamno, Rikyû ne esprimante internan teruron kaj indignon invitis tri gastojn al sia te-ĉambro por fari la lastan te-seancon. Detalaj partoj plenumi te-ceremonion laŭorde daŭris longe, iom tede. Sed la sceno karakterizas plej efike vivmanieron de Rikyû, majstrecon de teismo. Esprimis Miyamoto, ke “el lia mieno neniu povis legi ian maltrankvilon aŭ skuiĝon, sed li restis tute senŝanĝa de sia ĉiutaga konduto”.

La domo de Rikyû estis peze sieĝita de kvincento da soldatoj, sed nenio ĝenis lin. Li faris testamenton poemforman kaj sinmortigis per glaveto helpate de “kajŝako” de unu el la samurajoj en la te-ceremonio. Tre kortuŝa fino, sed ne kompatinda, ĉar tio estis brava batalo kontraŭ nerezonebla potenculo.

“La morto de Utamaro”

Diference de la okazo de Rikyû, ne troveblas kial Utamaro submetiĝis al kvindek tagoj da mankatena puno. Pri la kaŭzo la aŭtoro Miyamoto ne menciis, ĉar, laŭ li, tio bezonus apartan dikegan volumon. Sed mi pensas, ke tio estas tre grava afero interesi legantojn. Por solvi la enigmon mi legis japanlingve verkitan romanon, “Utamaro en krepusko”. Laŭ ĝi la ŝoguna registaro malpermesis diskonigi belulinajn portretojn, speciale kun luksa sceno kiel flor-admirado aŭ pompa festeno, ĉar tio detruus registaron. Probable Utamaro, fiera ukijoeisto, ne obeis la ordonon, nek volus malvenki kontraŭ Hokusai kaj Ŝaraku. En la lastaj jaroj Utamaro, kaduka maljunulo, vivis en vaneco preskaŭ neparolante.

“Pri arto kaj morto” de Miyamoto masao

Sibayama Zyun’iti

Miyamoto Masao (1913-1989) estas pioniro de japano verkinta Esperantajn originalojn, ĉu proze ĉu poezie. Li publikigis fikciaĵojn pri 4 japanaj artistoj en gazetoj, kaj aldoninte pliajn 4, libre eldonis tiun ĉi novelaron en 1967. Delonge elĉerpita, sed feliĉe la libro aperis kiel la dua eldono en 2017.

Multaj el la noveloj rilatas al la “morto” de

la artistoj, kies vivhistorio estas iel konataj al japanoj, sed Miyamoto emfazas unu eblan varianton en sian fikcion: ekzemple hajkisto Basyo mortis en 1694, lasinte faman hajkon jenan, kio estas fakto:

Sur voj’ vojaĝa
mi morbas; kuras sonĝo
tra kamp’ sovaĝa

Sed ĉu li en mortolito anhele elbuŝigis jene, estas nur fikcio.

Sur voj’... vojaĝa...
mi morbas;... kuras son... sonĝo...
tra... kamp’... sovaĝa...

La karakteriza trajto de la novelaro estas, kiel supre montrite, multaj tradukoj de japanaj fiksformaj mallongaj poemoj, nome “utaoj” kaj “hajkoj” aperas de la plumo de la tradukisto Miyamoto. Precipe “longutao”, t.e. verso kun ripeto de 5+7 silaboj kun fina 7-silaba verso, estas la virtuoza ekzemplo, kaj pluraj longutaoj aperas en la unua kaj dua novelo pri la utaistoj en la utaaro Manjoo en la 8-a jarcento.

Iel komedian tonon mi sentas en la lasta novelo, kiu temas pri moderna poetino Yosano Akiko kaj ties edzo Yosano Tekkan, kies poezia kompetento estas taksata malpli ol tiu de la edzino, kaj kion la edzo mem komprenas.

Nu, fine mi esprimas bedaŭron pri la dua eldono. En ĝi enestas kelkaj misskriboj ne entenataj en la unua eldono: ekzemple “enmamgi” kaj “forĉis” en p.110, kiuj estis respektive “enmanigi” kaj “forcis”. Kial? Mi supozas, ke la eldonisto de la dua eldono utiligis Optikan Liter-Legilon, por re-komposti la verkon sed ne bone provlegis.

Obstino

Tanigaŭa Hiroŝi

Mine Yositaka skribis: *Miyamoto Masao amis verkojn de Vasilij Eroŝenko, ĉar li trovis en ties verkoj simpatian figuron al si; malobeemon, kaj dubon al ĉiaj aŭtoritatoj, kaj amon al subprematoj.* Tion mi tutkunsentas.

Miyamoto Masao en sia juneco estis malliberigita 2 jarojn pro la sindikata movado. Kaj en 1944, 31-jara, li estis militalkovita kaj sendita al Okinavo kie, 1 jaron poste, ekfuriozis sangega batalo. Li decidis neniel morti kaj ĉiele travivi la abomenindan batalon

fare de la fanatikaj militistoj. Aktuale li travivis la Okinavan Batalon superŝutitan per senprecedenca ŝtormo de kuglegoj.

En la verkaĵo “Pri arto kaj morto” Miyamoto prezentas entute 8 historie konatajn protagonistojn ekde la antikva ĝis la moderna epokoj en Japanio. Mi vidis en ĉiu el ili komunan econ de “obstino ĝis la morto en arto”. Kaj tio komunas ankaŭ kun la tuta vivo de la aŭtoro Miyamoto, kiu obstine kontribuis al japana esperanto-literatura arto, mi sentis.

Du el la ĉefroluloj el la verkaĵo mi prezentu.

Ootomo-no-Jakamoĉi (718?–785), konsiderata kiel la ĉefkompilinto de *Manjoo*, japana antikva poemaro.

Jakamoĉi estis estro de la klano Ootomo. Lia klano ĉefrolis militkampe ekde la formiĝo de la japana antikva imperiestra reĝimo. Sed siatempe ĝi estis jam descendanta subpremate de la novleviĝanta klano Huĵiŭara. Kiam okazis konspiro mortigi Huĵiŭara-no-Nakamaro despote estrantan la reĝimon, li ne partoprenis en ĝi trovinte ĝin potencavida kun neniom da amo al la suferanta popolo.

Depost lia morto la klano Ootomo estis komplete forigita de la reĝimo, sed, dank’ al lia obstina aktivado super la beletra arto, granda nacia literatura trezoro “*Manjoo*” kun 4516 poemoj estis restigita.

Macuo Baŝoo (1644–1694), konata kiel la

kompletiginto de hajko kiel arto.

Plej multe da liaj arte rafinitaj hajkoj estis versitaj dum liaj vojaĝoj.

Survoje de la vojaĝo okcidenten Baŝoo mortis en Osaka. Lia cigna versaĵo estis;

Sur voj’... vojaĝa...
mi morbas;... kuras son... sonĝo...
tra... kamp’... sovaĝa...

Ĉi tiu hajko simbolas la tutan vivon de Baŝoo kiu ripetis vojaĝon dum kiu li obstine luktis por senfine elpoluri hajkojn kiel artaĵojn.

Li estis entombigita laŭ sia testamento ĉe la templo Giĉuuĵi en Provinco Oomi (nuna urbo Oocu, Gubernio Ŝiga), kiun li amis kaj loĝis.



s-ro Tanigaŭa antaŭ Ĝiĉuuĵi

Niaj Planoj

*apr. 20 [KK] Hama-Ronda Vespero

Unue parolos s-ro Suzuki Keiichiro pri la 100-jariĝo de Japana Esperanto-Instituto.

Due parolos s-ro Doi Hirokaz pri la projekto fondi Esperanto-muzeon.

*maj. 18 [KK] Hama-Ronda Vespero

S-ro Sasaki Teruhiro parolos pri la lastatempa situacio de Esperanto-movado en Ĉinio. Li restis kelkajn jarojn en Ĉinio, instruante kaj la japanan lingvon kaj Esperanton.

*jun. 15 [KK] Hama-Ronda Vespero

S-ino Doi Ĉieko parolos en la japana pri Hasegawa Teru (plumnome Verda Majo, 1912-1947). Teru, estante esperantisto, edziniĝis al ĉino siatempe studinta en Japanio, kaj kun li vivante en Ĉinio agis kontraŭ la japana invado al Ĉinio.

